

5-1922

F. 18

# AMERIKA ESPERANTISTO

DECEMBER, 1921



OFFICIAL ORGAN OF  
THE ESPERANTO ASSOCIATION  
OF NORTH AMERICA



# LEIPZIG-A SPECIMENFOIRO

FOIRO

POR TEKNIKO KAJ KONSTRUFAKO

Printempa Foiro 1922 de la 5<sup>a</sup> ĝis 11<sup>a</sup> de marto

Aŭtuna Foiro 1922 de la 27<sup>a</sup> de aŭgusto ĝis 2<sup>a</sup> de septembro

La centra merkato por la internacia  
komerco kaj ofertado

Same grava por ekspozantoj kaj por aĉetantoj

Informojn donas kaj aliĝojn akceptas

MESSAMT FÜR DIE MUSTERMESSEN  
IN LEIPZIG

(Fotografado por la Specimenfoiroj en Leipzig)

JOHANNES TZECHICHOLD • L26 • 1921

ATTENTION! ESPERANTISTS!

## The LLANO PUBLICATIONS

record the doings of the Llano Co-operative Colony in Louisiana. This group of co-operators are using Esperanto largely and aim to use it in their every day work. It is probably the only community of its kind. Children are taught Esperanto in the High school course. They are also co-operating in the production and distribution of the necessities of life. They have a beautiful social life in a healthy happy community. Write for literature and ask for a sample copy free.

LLANO CO-OPERATIVE COLONY

Leesville, Louisiana.

DEZIRAS KORESPONDI

Four insertions: 25 cents. Announcement consists only of name and full address. Additional matter: 10 c. per line or fraction thereof.

Kvarfoja anonco: 5 poŝtaj respond-kuponoj. Anonco konsistas nur el nomo kaj plena adreso. Plia linio aŭ parto: 2 r. k.

S-ro Jonas K. Miliauskos, Dideye Vilniaus G-ye, No. 14, Kaunas, Lithuania, Europe.  
Arthur A. Smith, Van Wert, Ohio, U. S. A.  
(Usono) deziras korespondi kun artistoj kaj fotografistoj, aŭ spertuloj aŭ lernantoj, vivantaj en ia loko de la mondo.

Herbert A. Wallace, 1915 No. 13th St., Kansas City, Kans.

# XIV:a Universala Kongreso de Esperanto

en Helsinko — Helsingfors, Finnlando, la 6—12 de Aŭgusto 1922

## ALIGILO.

I.

Mi subskribinto aliĝas al la XIV-a kiel — kongresano — helpkongresano<sup>1)</sup>.

Familia nomo: S-o, S-ino, F:ino<sup>1)</sup> <sup>2)</sup> .....

Antaŭnomo: .....

Titolo: .....

Profesio: .....

Nacieco: .....

Gepatra lingvo: .....

Lando (Ŝtato): .....

Provinco: .....

Urbo: .....

Strato kaj №: .....

Mi estas ano de la Esperantista Grupo .....

en .....

Ano de UEA — jes — ne? Mi estas esperantisto de la jaro .....

Kune alvenos la jenaj samfamilianoj (nomo kaj titolo)

So, Sino, Fino: .....

So, Sino, Fino: .....

So, Sino, Fino: .....

So, Sino, Fino: .....

So, Sino, Fino: .....

II.

Kotizo: Montrita en tabelo. Ĉiu pagas en la mono de sia lando. Samideanoj el landoj kun aliaj monunuoj, krom tiuj en la tabelo montritaj, pagu aŭ dolarojn, ŝilingojn aŭ frankojn aŭ petu pri speciala aranĝo. Pluaj samfamilianoj pagas nur 60 % de la kotizo, Post la 1:a de Junio 1922 la kotizo altiĝos je 50 %.

Mi mendas: (rigardu la tabelon de la prezoj)

1 Kongresan karton por mi . . . . .

Kongresajn kartojn por samfamilianoj . . . . .

„ „ „ helpkongresano . . . . .

Kongresajn poŝtkartojn . . . . .

Foliojn de 30 kongresaj glumarkoj, 3 diversaj . . . . .

Turistan gvidlibron „Vojaĝado en Finnlando“<sup>3)</sup> . . . . .

jarkol. de „Esperanta Finnlando“ 1922 . . . . .

Transportota .....

<sup>1)</sup> Forstreku la netaŭgan. <sup>2)</sup> Skribu tre legeble aŭ prefere skribmaŝine. <sup>3)</sup> Aperos en februaro—marto 1922.

Krom tio mi sendas: Transportita .....  
 por esti deponita en mia konto ĉe la kongresa banko . . . . .  
 donaco al la kongresa kaso . . . . .  
 donaco por la blindula eldona kaso . . . . .

---

Tiel mi sume sendas

---

per tio-ĉi en registrita letero — per bankĉeko — kontante.

Por la Garantia Kapitalo mi notas Fmk. ....

III.

Mi deziras jui ..... ĉambro(j)n kun ..... lito(j) por ..... tagoj en  
 hotelo 1:a grada — hotelo 2:a grada — hejmo por vojaĝantoj — hospizo.

Mi deziras ..... lito(j)n en privata loĝejo por ..... tagoj.

Mi deziras loĝi en komuna malkara loĝejo kaj mendas ..... lito(j)n por ..... tagoj.

Mi estas — ne estas — vegetarano.

Mi alvenos certe — proksimume — la ..... de Aŭgusto.

IV.

Mi intencas resti en Finnlando ..... tagojn — semajnojn — antaŭ — post — la  
 kongreso kaj petas informojn pri turistaj vojaĝoj — banlokoj —

(notu dezirojn) .....

Mi intencas dum la kongreso ĉeesti la fakajn kunsidojn de .....

Mi interkonsentis kun la redakcio de la gazeto ĉiutaga — semajna, monata  
 ilustrita — neilustrita .....

aperanta en .....  
 pri publikigo de antaŭkongresaj novaĵoj, farotaj de mi laŭ la komunikoj de LKK, kaj de post-  
 kongresa raporto laŭ artikolo kaj ilustraĵoj, kiujn bonvolu sendi al mi por traduko kaj enpresigo.

Loko kaj dato: .....

Subskribo: .....

# Amerika Esperantisto

## American Esperantist

WEST NEWTON 65, MASS.

Subscriptions, etc. to Boston Office, redakcia adreso, 12 Ash St. Pl., Cambridge 38, Mass.

Entered as second-class matter May 15, 1913, at the Postoffice at West Newton Station, Boston, Mass., under the Act of March 3, 1879.

One Dollar a Year.

Po Dudek Respond-Kuponoj aŭ Du Spesmiloj (Oraj) Jare.

Single Number 10 Cents.

Every article in this magazine (unless expressly excepted) may be translated or reprinted without further permission.

Published Monthly by

THE ESPERANTO ASSOCIATION OF NORTH AMERICA

The Esperanto Office, Pierce Bldg., Copley Sq., Boston, Mass., Usono.

Vol. 29.

December, 1921.

No. 2.

### ESPERANTO IN THE SCHOOLS

Esperanto holds out certain inducements to the three classes of schools: the public school, the business school, and the private school. Esperanto is not yet a regular public school subject of any of the greater European countries (except perhaps Russia), but it has obtained official status in local communities and in the smaller nations. Our first great victories will come—or we may say are coming—in the lands where the help of an interracial language is most needed; in Finland, Esthonia, Livonia, Latvia, Poland, Ukrainia, Rumania, Hungary, Czechoslovakia, Jugoslavia, Bulgaria, Greece, and other small states. Next are coming the countries bordering on and trading with these states, and perhaps last of all self-sufficient and complacent Uncle Sam.

There is no reason for supposing that the public school authorities of America are today even considering the introduction of Esperanto courses, and until there is a public majority favorable, public school courses should be optional only. But even for optional courses the parents must either be willing to be convinced of Esperanto's use or else have complete confidence in the judgment of their school authorities who take such action.

For these reasons we may reasonably expect that first will be opened the minds of leading private educators. We ask those educators, bold in their convictions and not slavishly subservient to mass apathy or antipathy to change, to consider calmly whether Esperanto would be worth while in their curricula. We present our claims merely, citing some authority for them and asking only fair investigation and judgment.

The first question is one of time.

We give an estimate for intermediate and advanced pupils in units of some 200 to 300 hours in and out of school in America. We make no claim that our figures would apply in case of actual in-residence study of these languages. The parentheses indicate full conversational use. We assume that Esperanto is the first studied.

Esperanto alone 1 (2).

One foreign language 4 (8).

Two foreign languages 7 (14).

Three foreign languages 10.

Esperanto, the mean of the Aryan languages as an introductory.

Esperanto (2) and one foreign language 3 (7), total 5 (9).

Esperanto (2) and two foreign languages 5 (11), total 7 (13).

Esperanto (2) and three foreign languages 7, total 9.

At present Latin is largely used, for historical reasons, tho confessedly difficult.

Latin 5 and one foreign language 3 (7), total 8 (12).

Latin 5 and two foreign languages 5 (11), total 10 (16).

Latin 5 and three foreign languages\*, 8, total 13.

\*One not a Romance Language.

To understand the basis of our estimates see "Teachers' Number," *Amerika Esperantisto*, April, 1919. For reports of the actual practical experience we refer you to the British experiments at Eccles and other schools and the report of the investigating Parliamentary committee thereon. Send for "Esperanto in the School," or any information to the Esperanto Office, 507 Pierce Building, Boston 17, Mass. Or, for a sen parte opinion, why not consult the International Research Council's Committee on International Auxiliary Language, 1701 Massachusetts Avenue, Washington, D. C., U. S. A.

One other factor in a true time comparison is the fact that Esperanto obviates the need of learning to write and speak in foreign languages. Esperanto does not aim to displace English at home and does not claim to be the only foreign language worth study. It does claim to be the only non-home language for conversational use worth learning in the homeland.

Aside from the time-saving Esperanto presents, several notable advantages also accrue.

**Logically** Esperanto, while not without a few idioms, is in use essentially a selection and combination of exact idea word-elements, chosen from the common modern Aryan word-stock. The result is that every word is marvelously precise and unmistakable.

**Grammar** is forcibly impressed upon the student by the constant word terminations, and becomes a clear and ineffaceable possession of the student. For this reason several educators have counseled the study of Esperanto before that of English grammar.

**Spoken use** of Esperanto can hardly be guaranteed here in America but thruout Eurasia are thousands of Esperanto clubs and thousands of delegate-consuls of the world-wide *Universala Esperanto Asocio* who are pledged to perform every possible friendly service to their fellow-Esperantists. A traveller, say in Russia or Japan, has only to write ahead of his itinerary and time of arrival and he

will find active help and a welcoming greeting in Esperanto.

The thoughtful educator will no doubt be equally impressed with the ethical side of Esperanto, the "Esperantism," for the Esperanto world is permeated with a spirit not of individual acquirement but of practical idealism.

A **definite means to world peace** and concord is what we see in Esperanto. As Esperantists we propose not to sigh for it but to strive for it.

**Neutrality** in religion and politics is one of the fundamental tenets of the Esperantist associations, altho practically all the great sects from the Roman Catholic to the Theosophist, recognizing the value of Esperanto to their own purposes, have organizations and publications in the language.

In other departments, too, as in **medicine** or **science**, Esperanto promotes acquaintance with the views of others, while in no way requiring us to give up our own. We, of course, do not guarantee that it will not in time modify and broaden the opinions of its users.

Esperantism presents a **definite altruistic** purpose, it as yet guarantees no certain financial reward, but only service, a labor of love. The benefit therefrom is to embrace all humanity; needless to say there is no color line nor race line to Esperantism.

Esperanto is not necessarily absolutely perfect, but we have yet to see any improvement or substitute that has any relative appeal to the vast numbers now trying out Esperanto. If changes come, they will be small and gradual, well weighed by acknowledged and competent authority and backed by the Esperantists as a unit. The hundred and one individual's language projects and "improvements," whatever their merits as theories, are numerically and practically insignificant, and a mere irritant to the world movement.

---

### ESPERANTO LIGILO AND THE BLIND

Whatever the uses Esperanto has for each one of us, to the blind it is a miracle-working instrument. Into their lives of isolation and darkness it brings the light of comradeship. It gives them a new joy, a fresh interest, a richer and more beautiful existence. It brings to their hearts a great enthusiasm, fills their spirits with brilliant aspirations, new hopes and aims, enables them, thru reading "Esperanto Ligilo" to join in with the daily life of the blind of every land. They cease to be isolated sufferers; become brothers and friends.

Up to now the blind have received this blessing of Esperanto thru the tireless efforts of a few: notably Cart, Stejskal, Jung, Merrick, and Thilander, who have given a great part of their lives to provide literary treasures for the blind. The centre of their work has been in "Esperanto Ligilo," which holds over 600 blind readers together. Now this magazine is endangered. 3,000 spesmiloj—\$1,500—a year are needed to keep it alive.

All the magazines and all delegates of the U. E. A. are asked on the first week of January to collect a sum every year for "Esperanto Ligilo." Think not that others will send enough money, do your best

to make it a success. Look to the heavens, the sun, the moon and the stars and as a thank-offering that the Good God gave you sight send a gift for this aim of sympathy and love.

Send the money thru your U. E. A. delegate, A. E., or direct to W. Percy Merrick, Woodleigh, Shepperton, England.

—Translated summary from Esperanto of John Merchant, v. prez. B. E. A.

**Parolado de Prezidanto Harding je la Malfermo de la  
KONFERENCO PRI LA LIMIGO DE MARŝIPAROJ  
de la Mondo**

S-ro Sekretario kaj Kongresanoj; Sinjorinoj kaj Sinjoroj: Estas granda kaj feliĉa privilegio bonvenigi la delegitojn de ĉi tiu konferenco en la kapitalo de Usono. Ne nur estas kontentigo bonvenigi vin, ĉar ni estis antaŭ nelonge partoprenantoj de komuna afero, en kiu partoprenataj oferoj, kaj malĝojoj, kaj triumfoj kunligis niajn naciojn pli firme, sed estas kontentige paroli al vi, kiel por-parolanto por nacioj kies konvinkoj kaj servemaj agoj tiel multe rilatas al la feliĉeco kaj malĝojoj de la homaro.

Neeble estas tro taksi la gravecon de tia konferenco. Estas ne malkonvena fanfarono, nenia malestimo de aliaj nacioj, kiuj, kvankam ili ne estas reprezentataj, restas respektegataj, deklari ke la konkludoj de ĉi tiu konferenco grave influos ĉian homan progreson—la sorton de la mondo.

Jen kunveno, mi ja kredas, kiu estas konstato de la vigligita konscienco de la civilizacioj de la 20a centjaro. Ĉi tiu ne estas kunveno de memproĉo nek kunsido de malĝojoj; nek konferenco de venkantoj por difini kondiĉojn de saldado, nek konsilio de nacioj penante refarigi homaron. Plimulte estas renkontiĝo, el ĉiuj partoj de la mondo, por plibonigi la ecojn de homaro, por malgrandigi la kulpojn en niaj internaciaj interrilatoj.

Parolante kiel oficiala garantianto por la invito, mi opinias ke mi rajtas diri, ke la voko ne estas de Usono sola, pliĝuste ĝi estas la eldirita vorto de militlacigita mondo, baraktanta por restarigo, malsatanta kaj soifanta por pli bona kunuleco; de homaro alvokanta helpon kaj peteganta certigon de daŭra paco.

Facile estas kompreni tiun tutmondan celadon. La gloro de triumfoj, la gojado pri elfaro, la amo de libereco, la sindono al la patrujo, la doloro de malĝojoj, la ŝarĝoj de ŝuldo, la dezerteco de ruiniĝo—ĉiuj ĉi tiuj estas simile taksitaj en ĉiuj landoj. Ĉi tie en Usono, ni ĵus turnis nin de la enterigo de nekonata soldato usona, kiam nacio malĝojas pagante al li respekton. Ĉu estis dirite aŭ ne, cent milionoj el nia popolo estis resumigantaj la neforkulpeblan kaŭzon, la nekalkuleblan koston, la neeldireblajn malĝojojn, kaj elstaris tie la ĉiam urĝa demando: Kiel povos homaro senkulpiĝi sin se [eĉ] Dio pardonos? Homa malamo postulas neniun tian imposton; al ambicio kaj avido oni devas ĝin nedoni. Se malkompreno responda estas, ni forpelu ĝin, kaj interkompreno regu kaj starigu bonvolon reganta ĉie. Ĉiuj el ni postulas liberecon kaj justecon. La



unu ne troviĝas sen la alia, kaj oni devos ilin teni nedisputebla posedo de ĉiu popolo. Rajtoj desiaj estas de Dio, kaj la tragedioj de la mondo devenas de la provado ilin nei. Hodiaŭ la mondo translimigas ĝuadon de tiuj per armado por defendo aŭ fortinado, kvankam racieco mem postulas konstaton de ili per komuna kompreno.

El la kataklismo de la mondmilito stariĝis novaj kunulecoj, novaj konvinkoj, novaj esperegoj. Nia tasko estas plej bone uzi ilin. Mondo ŝanceliĝa de ŝuldo bezonas sian ŝarĝon levota. Homaro skuita de malica detruo volas kiom eble plej malgrandigi la perantojn de tia detruo. Rigardante la nemezureblan koston de la milito kaj la daŭran ŝarĝon de armilaro, ĉiuj pensemaj popoloj deziras veran limigon de armado, kaj volas ke milito estu mallegitimigita. En plej serioza pripenso la cent milionoj de la mondo, kiuj pagas dum paco kaj mortas dum milito, deziras ke iliaj ŝtatestoj turnu la pordetruajn elspezojn en rimedojn por konstruado, celante pli altan staton por tiuj kiuj vivos kaj sekvos.

Ne nur estas, ke la mondo ne povas realĝustigi sin, kaj forĵeti la troajn ŝarĝojn, sen helpo de la ĉefoj de homaro. Milito kreskas progreseme kruela kaj pli detrua, de la unua registrita barakto, ĝis tiu ĉi sortgraveda tago, kaj la renverso de tiu vico decus al nia fanfara civilizado.

Sinjoroj de la konferenco, Usono bonvenigas vin per neegoistaj manoj. Ni sentas nenian timon; ni havas neniajn malnoblajn celojn; ni suspektas nenian malamikon; ni pripensas nek konkeronte nek konkerote. Kontentaj je nia posedaĵo, ni ne deziras la havaĵon de alia. Ni nur volas kun vi efiki tiun pli laŭdindan noblan faron, kiun neniu nacio sola povas fari.

Ni volas kunsidi kun vi je la tablo de internacia kompreno kaj bonvolo. Efektive ni avide volas renkonti vin sincere por inviti kaj proponi kunhelpadon. La mondo postulas pripenseman rigardadon de la ekzistanta stato, kaj la komprenon, ke ne ekzistas resanigilo sen ofero, ne de unu, sed de ĉiu el ni.

Mi ne aludas fordonotajn rajtojn, nek mallarĝotan liberecon, nek neotajn celojn, nek nekonsiderotajn naciajn necesojn. Nia respubliko nek petus nek cedus ĉi tiojn. Ne necesas humiliĝi ies fieron aŭ subakvigi iun naciularon, sed mi volas interŝanĝon de spirito kompromitantan ĉiujn el ni al malpli da militpreparo kaj pli da ĝuado de feliĉa paco.

La pli altaj esperoj venas el la spirito de nia kunveno. Estas nur justeco konstati diversajn bezonojn kaj apartajn situaciojn. Nenio elfariĝos se oni malrespektas naciajn timojn. Prefere, ni agu kune por forigi la kaŭzojn de timoj. Tio ne fariĝos per intrigo. Pli granda garantio troviĝas en interŝanĝoj de nuraj honesto kaj rekteco inter viroj deciditaj plenumi, kiel taŭgas al ĉefoj el nacioj, kiam civilizado mem estas veninta al sia kriza provo.

Ne estas malkonstateble ke registaro malsukcesas kiam troeco da ĝia kosto rabas de la popolo la vojon al feliĉeco kaj la okazon por ebla atingado. Se la pli bonegaj sentimentoj ne estus instigantaj, la sobrigaj, severaj faktoj de troa kosto kaj la elokventeco de ekonomio instigus nin malgrandigi niajn armilarojn. Se la koncepto pri

pli bona ordigo ne altiras, do ni pripensu la ŝarĝon de daŭrigita konkurso.

Oni ne povas nei, ke la mondo balanciĝas tra la epokoj sen atento al ĉi tiu alvoko el la viroj pli bonkoraj. Sed tiu sama mondo neniam antaŭe tiom tragedie devige konceptis la vanegecon de la regado de agiteco, kiam racio kaj konscienco kaj kunuleco elmontras pli noblan vojon.

Mi povas oficiale paroli nur por nia Usono. Niaj cent milionoj malkaŝe deziras malpli da armilaro kaj neniom da milito. Tute liberaj de artifiko, certaj en niaj propraj spiritoj ke ni ne tenas mallaŭdindajn intencojn, ni alkedras al la mondo similajn bonintencojn. Tial ni bonvenigas vin, ne nur kun bonvolo kaj alta celo, sed kun alta fido.

Ni renkontiĝas por servo al homaro. En tutaj simpleco, honesteco, kaj honoro, eble estos skribita ĉi tie la konfesoj de mondkonscienco, rafinita per la konsumantaj fajroj de milito, kaj farita pli sentema per la maltrankvila sekvo. Mi esperas tiun komprenadon kiu akcentos la garantiojn de paco, kaj kompromitojn al malpli da ŝarĝoj kaj pli bona ordo, kiu trankviligos la mondon. En tia atingo estos aldonita gloro al viaj standardoj, kaj al la niaj, kaj la ĝojado de homaro fariĝos la superega muziko de la tuta estonteco.

Parolado de Prez. Harding je Washington, Nov. 11, 1921.

Traduko de F-ino E. Ohman. (iom redaktita)

## PAROLEJO

In but not about Esperanto | not over 500 words | free to all | signature and address required  
 En sed ne pri Esperanto | ne pli ol 500 vortoj | por iu senpage | nomo kaj adreso postulataj  
 (The editors express neither approval nor disapproval of statements under this head, the facts are on the authority of the person named. Not open for any articles upon Esperanto subjects proper.)

La Brita Literatura kaj Debata Societo anoncas siajn Literaturajn Konkursojn 1922ajn:

Premioj: por ĉiu konkurso: 1a premio 30ŝ. 2a premio 20ŝ.

1. Traduko el Angla Literaturaĵo. De 2,000 ĝis 3,000 vortoj.
2. Originala Novelo. De 1,000 ĝis 2,000 vortoj.
3. Originala Poemo. Ne pli ol cent linioj.

Kondiĉoj:—1. Konkursantoj, se membroj de la Societo, devas pagi 1ŝ. por ĉiu manuskripto: se ne-membroj, 2ŝ por ĉiu manuskripto. 2. Konkursantoj devas alpreni pseŭdonimon, kiu aperos sur la manuskripto. Ili devas skribi la nomon kaj adreson—kune kun la pseŭdonimo—sur aparta folio, kaj enmeti ĝin en koverton, sigelante ĝin kaj skribante la pseŭdonimon ekstere. Tiun koverton ili devas sendi kun la manuskripto. 3. Ĉiuj manuskriptoj fariĝos la propraĵo de la B. L. kaj D. S. La Komitato de B. L. kaj D. S. rezervas al si ĉiujn rajtojn pri publikigo de manuskriptoj. 4. La Komitato de B. L. kaj D. S. rezervas al si rajton, aŭ ne doni, aŭ dividi, iun ajn premion. Se manuskriptoj de sufiĉa merito estos ricevitaj, medalo aŭ medaloj estos aljuĝitaj. 5. Manuskriptoj devas atingi la sekretarion antaŭ Februaro 28a, 1922.

Hon. Sek.: Charles H. Edmonds,  
 "Rockwood," High Road, Wembley, Anglujo.

## XIV UNIVERSALA KONGRESO EN HELSINKI

### UNUA KOMUNIKO (mallongigita)

1. **L. K. K.** La loka Kongresa Komitato konsistas el jenaj personoj: S-ro Albin Sandstrom, prez., Lektoro K. S. Ahonius, vic. prez., S-ro Vilho Setala, ĝen. sekr., S-ro G. Cernohvostov, sekr., kaj S-ro Leo Jalava, kasisto.

2. **Adreso.** La oficiala poŝta adreso de la Kongreso kaj de L. K. K. estas: XIV-a Kongreso de Esperanto, Helsinko (aŭ Helsingfors), Finnlando. Ĉiuj korespondadoj, koncernantaj la kongresajn aferojn, ankaŭ monsendoj, estu adresataj nur al tiu adreso. Telegram-adreso estas: Esperanto, Helsingors.

3. **Aliĝo.** Samideanoj, dezirantaj aliĝi al la XIV-a estas petataj uzi la aliĝilojn eldonotajn de la L. K. K. La aliĝiloj estos dissendataj kun la plej multaj esperantaj gazetoj. Samideanoj, kiuj tiel ne ricevos la aliĝilon, petu ĝin de la L. K. K.

Samideanoj, kiuj jam nun aliĝas, sed pro ne antaŭviditaj kaŭzoj ne povas ĉeesti la kongreson, ricevos, se ili ne volas fariĝi helpkongresanoj, 75% de la pagita kotizo, se ili pri tio sciigas la L. K. K. antaŭ la 1-a da Julio 1922. Pri kurza diferenco la L. K. K. tamen ne respondas.

La samideanoj-aliĝontoj estas serioze petataj kiom eble plej baldaŭ aliĝi kaj pagi la kotizon.

4. **Kotizo.** La fikso de la Kongresa Kotizo estis tre malfacila al LKK. Ni konsideris, ke la sumo efektive pagota de la altvalutaj landoj povas esti pli alta ol tiu pagota de la malbonvalutaj, tamen ne tiel, ke la lastenomitaj kaŭzo puran malprofiton al la kongresa kaso. Tiel serĉinte ian mezon, ni venis al jena tabelo:

4 dolaroj.

Ĉiu pagas en la mono de sia lando.

Pluaj samfamilianoj pagas nur 60% de la kotizo.

Post la 1-a de Junio 1922 la kotizo altiĝos je 50%.

5. **Helpkongresanoj.** Samideanoj kiuj ne havos okazon ĉeesti la XIV-an kongreson, povos tamen helpi al ĝia bona sukceso, aliĝante kiel helpkongresanoj. La helpkongresano pagas la Kongresan kotizon kaj ricevos la Kongresan insignon kaj ĉiujn kongresajn dokumentojn.

6. **Garantia Kapitalo.** Por certigi la ekonomian rezultaton de la XIV-a estas fondata speciala Garantia Kapitalo, al kiu la samideanoj estas petataj noti garantiojn po almenaŭ Fmk. 300:— La garantiitaj sumoj estos enkasigataj nur en la okazo ke la kongresaj elspezoj superos la enspezojn, kaj proporcie laŭ la ebla malprofito.

7. **Donacoj.** Sub ĉi tiu rubriko ni notos donacojn, faritajn al la Kongresa Kaso. Ĉar la organizaj elspezoj estas tre grandaj, kaj nur parte povos esti repagataj per la kongresa kotizo, la LKK sin turnas al ĉiuj samideanoj, petante monsubtenon sub ĉi tiu rubriko.

8. **Depono de Mono.** Laŭ interkonsento, kiun faros LKK kun la Kongresa Banko (nomo sciigota en la venonta komunikado), la samideanoj, kiuj deziras uzi la nunan tre favoran kurzon por rezervi al si finajn markojn, povas tuj sendi monon al la kongresa kasisto (sub

la oficiala adreso de LKK) kiu ŝanĝos ĝin en finnajn markojn kaj malfermos konton por la aliĝinto. Alvenante ĉitien dum la kongreso, la aliĝinto-deponinto povos libere disponi sian monon. La banko nuntempe pagas 7% renton por deponita mono.

La LKK ankaŭ jam nun volas atentigi al la estontaj kongresanoj pri tio, ke oni ĝenerale devus eviti sendon aŭ alporton de papermono, ĉar ŝanĝante papermonon oni ĉiam perdas en kurzo. Ni konsilas al la aliĝintoj laŭeble sendi kaj kunporti monon nur per bankĉekoj aŭ per kreditleteroj. Pro la tre malalta kurzo, uzata de la poŝto, ni insiste malkonsilas sendon de mono per poŝtmandato kaj respondkuponoj.

9. **Fakaj kunsidoj.** Personoj intencantaj kunvoki specialajn fakajn kunsidojn dum la kongreso, estas petataj pri tio kiom eble plej frue informi la LKK samtempe sciigante por kiom da personoj proksimume ili bezonas ĉambron kaj dum kiom da horoj. En la sekvontaj komunikoj estos sciigato al kiuj personoj la LKK komisiis la lokan organizon de la diversaj fakaj kunsidoj.

10. **Ekspozicio.** La LKK intencas aranĝi dum la kongresa semajno grandan publikan propagandan ekspozicion pri Esperanto.

Por ke ĉitiu fariĝu kiom eble plej valora, instrua kaj impona, samideanoj ĉiulandaj estas urĝe petataj donace sendi al LKK en Esperanto eldonitajn presajojn, prospektojn, katalogojn, gvidlibrojn, gazetojn, librojn, sigelmarkojn, poŝtkartojn kaj aliajn ekspozindajn esperantajojn.

Personoj kiuj posedas gravajn, maloftajn dokumentojn, precipe pri la unuaj tempoj de Esperanto, kiujn ili ne povas donaci, estas tamen petataj pruntedoni la dokumentojn al la LKK, kaj ricevos ilin post la kongreso.

11. **Propagando.** Por fari tre bonan propagandon pri la kongreso, la samideanoj estas petataj kiel eble plej multe aĉeti kaj uzi la kongresajn poŝtkartojn kaj sigelmarkojn, baldaŭ eldonotajn.

13. **Sciigoj al aliĝintoj.** La LKK sendos ĉiujn kongresajn komunikojn presite al ĉiu aliĝinto kaj al la Esperanta gazetaro.

14. **“Esperanta Finnlando.”** Laŭ interkonsento farita inter la LKK kaj la administracio de “Esperanta Finnlando,” la kongresanoj ricevos la nomitan gazeton je specialaj favorprezoj, se ili abonas ĝin samtempe kiam ili aliĝas al la kongreso.

La Loka Kongresa Komitato de la XIV-a.

Oni ĵus sciigis nin pri la morto, Dec. 2an, de **William H. Huse**, instruisto kaj gimnaziestro el Manchester, N. H. Li estis spertulo kaj verkisto en la fakoj Ornitologio, Zoologio, kaj Mineralogio. Ano de la Pionira Esperanto Grupo, li kelkajn jarojn kondukis klasojn ĉe la Manchester Institute of Arts and Sciences. Li estis estinta estro de la E. A. N. A. Propaganda Komitato, kaj vic-delegito de U. E. A.

## ENLANDA KRONIKO

**Topeka, Kans.**—Okt. 28. oni organizis ĉe la Centra Y. M. C. A. Topeka Esperanto Klubo, kies fondintoj estas: Rev. kaj S-ino J. H. Fazel, Ges. A. A. Austin, Ges. H. E. Buchanan, F-ino Irene Austin, D-ro W. J. Robb, F-ino Della Robb, S-ino Fred J. Hill, F-ino Opal Kennedy, Keith Montgomery, kaj Richard Gardner. Oni elektis oficistaro jenajn: prez., Rev. J. H. Fazel; v. p., Richard Gardner; sek., F-ino Irene Austin; kaj kas., S-ino H. E. Buchanan.

—Nov. 5. oni kunvokis samideanojn de la tuta ŝtato, sabaton posttagmeze al la Centra Y. M. C. A. Multaj ĉeestis la vesperan propagandan kunvenon por aŭdi interesajn raportojn pri la progresoj de Esperanto je Praha kaj aliloke, kaj la paroladojn anglajn kaj esperantajn. Rezulte de la kunveno oni starigis klason ĉiusabatan, kiun instruas S-ino A. A. Austin, kies unuan lecionon ĉeestis 27.

**Montreal, Que., Can.**—Prez. Bardorf paroladis antaŭ la Montreal Electric Club, kaj multaj ĉeestantoj montris sian intereson per aĉeto de ŝlosiloj, ktp.

—S-ro Pratley interesege raportis pri sia vojaĝo tra Esperantujo kaj pri la Praha kongreso. Li notis precipe la progresecon en Germanujo kaj la malgrandaj ŝtatoj de Eŭropo.

**Boston, Mass.**—Nov. 15. komencis D-ro Lowell kurson ĉe la Bostona Klubo, 507 Pierce Bldg. Proksimume 15 aliĝis al tiu ĉi pagata kurso, kaj oni proponas al si akiri kiom eble plej multe da Esperanto en dek aŭ dekdu lecionoj. Vizitas nin S-ro Gorani, arĥitekto el Italio kaj diplomito de Parizo. Lastatempe revenis el New Mexico Samideano Roger Goodland.

—Oni memoru la kvinsabatan harĉon, Decembron la 31an.

**Detroit, Mich.**—La 8an de novembro, 1921, en nia Esperanto-Oficejo okazis granda kunveno, ĉe kiu estis preparolataj diversaj Esp. aferoj, precipe la plua Esperanto-movado en nia urbo. La diskutoj estis en Esperanto. La kursoj estas gvidataj de S-ro A. M. Koliner dufoje ĉiusemajne: marde kaj vendrede. La kursanoj bone progresas.

Albert M. Koliner, sekr.

**San Francisco.**—La 15an de Oktobro, 1921, ni festis nian sepan jar-kunvenon en Santa Clara Halo, Native Sons Bldg., San Francisco. Tiu ĉi ĉambrego estis bele ornamita per floroj kaj foliaĵoj. Sur la muroj troviĝis belartaj afiŝoj; sur tablo estis libroj kaj esperantaĵoj. S-ro A. S. Vinzent prizorgis la vendadojn kaj la kotizojn por U. E. A.

Je la 3.30a horo ptm. okazis la laborkunsido. S-ro Prez. B. F. Ames prezidis kaj F-ino M. D. Van Sloun dejoris kiel Sek. La kunsido malfermiĝis per legado de la salutleteroj kaj per parolado de S-ro Ames pri la agadoj de la pasinta jaro, precipe pri la reorganizo de nia Asocio. Li sciigis al la kunvenintoj, ke la nomo de la Kalifornia Esperantista Rondaro estis ŝanĝita, kaj nun estas **Esperanto Association of California**, Incorporated. La Sekretariino legis la novajn statutojn de la Asocio. La samaj Direktoroj estis balote reelektitaj por la nuna jaro.

Post fermo de la kunsido la kunvenintoj iris al Hotel Stewart por la Festmanĝo. Oni alkondukis nin al la nova, belega "Blua Ĉam-

bro." Kiel bela la florornamita tablo! Kaj, kiel bongustaj la manĝaĵoj! Ĉio estis tiel mirinde kontentiga, ke ni volis resti kaj babili plu, sed devas okazi la vesperprogramo. Jam aŭdontaro atendis nian revenon en Santa Clara Halo.
